


# HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiunonata gazeto, aldono al HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO  
senpaga por ĝiaj abonantoj. Adreso: Julio Mangada Rosenörn. — Glorietta  
de Bilbao, 5, MADRID

NUM. 2. — FEBRUARO 1928



Tombo de la Majstro

## POR TUTMONDA ESPERANTO-UNUIĜO

Dum la Mezepoko la rajto de pugno kaj bato de multenombraj feŭdalaj potenculoj disponis por si la teritoriojn laŭ sia kaprico dank' al forto de siaj pugnoj; je la Modernepoko malgranda nombro da pugnobatistoj, profitante cirkonstancojn, koncentrigis per la sama rajto helpata de tiaj cirkonstancoj teritoriojn laŭ nacioj; je niaj tempoj, spite de la ĝenerala tutmonda evoluado al veraj homaj rajtoj, ankoraŭ pugnobatistoj regas kaj decidas, kaj ili eksplodigis la tutmondan militon ĵus pasintan, kaj nun hejtas per fanatika naciismo la cindrojn de la tutmonda bruligado, kiu ankoraŭ konservas fajrerojn, kiuj ree povas eksplodigi alian militon. Tiu fanatika naciismo ne atentis la vortojn de Ernest Renan (kiu ankaŭ profetis la ĵus pasintan tutmondan militon) konstatantajn, ke Nacioj havis sian originon kaj havos sian finon, ke en Eŭropo ili fariĝos Kunigitaj Ŝtatoj, ĉar la sola fundamento por nacio estas *interkonsento kaj memdecido de la loĝantoj por starigi nacion*, tial ke raso, lingvo kaj religio, ne estas fundamentoj por ĝin starigi; kaj nuntempe en ĉiuj nacioj disvastiĝadas sento al interkonsento por granda komunumo de popoloj.

Ni, Esperantistoj, sentas tiun senton, ĉar nia kara lingvo venis por faciligi la interkonsenton kaj starigi «unu solan grandan rondon familian», detruante la «obstinajn barojn» starantajn inter la popoloj; sed ĝis nun, ni nur agis platone, kaj estas nepre necese agi praktike, forĵetante de sur ni la pezan tradiciemon embarasantan nin, starigante kvaŭzaŭ tutmondan Esperanto-Ŝtaton, kiu per konstanta pligrandiĝo estu iam tre potenca kaj influa. Por ĉi tio, ni jam havas firman bazon, kiu estas Universala Esperanto-Asocio; sed, por efektivigi la projekton, U. E. A. devas starigi alian membro-klason, kies individuoj pagos duonon el la nuna malplej alta kotizo, t. e., *tri pesetojn* por Hispanoj. Sed tian membrecon ne povos havigi al si la eksmembroj kaj nunaj membroj de U. E. A.

Stariginte tian membrecon (per kiu U. E. A. ne perdos, sed gajnos), la Esperantistoj ĉe la nacioj ariĝos laŭ lokaj Grupoj; la Grupoj, laŭ naciaj fakoj aŭ teritorioj de U. E. A., kaj ĉi tiu laŭ tutmonda Konfederacio, en kiu teritorioj funkciados aŭtonomie. Ne baras la projekton, ke eĉ la Grupoj ariĝu interne de la teritorioj, laŭ sia volo, regione eĉ



urbe. En Hispanujo ekzemple, esperantisto aliĝos al loka Grupo pagante jare al ĝia kaso *dekdu pesetojn* (minimuma kotizo estos *dekdu pesetoj jare*), pagante ĉi tiun sumon laŭ jene: *ses pesetojn kaj duonon*, je la unuaj tagoj de januaro; *duonon da peseto* po ĉiu restanta monato. Per la *ses pesetoj*, pagataj je januaro, la Grupoj pagos la specialan membrecon al U. E. A., *tri pesetojn*, kaj la membrecon al nacia Asocio, *aliajn tri pesetojn*. Tiamaniere ni starigos nian movadon de la simplaĵo en la malsimplaĵon, unuigante ĝin tute firme laŭ pure esperanta idealo, simpligante la organizon kaj la kotizojn.

La rajtoj de la specialaj membroj estos: la karneto; utiligi servojn de la Asocio per aĉeto de servokupono (U. E. A. fiksis la prezon de la kupono, kiun ĝi stampas speciale); aĉeti la Jarlibron per speciala favora prezo; ĉe ĉiu Grupo, aro el kvin specialaj membroj povos voĉdoni same, kiel unu sola nuna membro.

Ni, nuntempaj diversaj membroj de U. E. A., konstante propagandos kaj penados por ke la specialaj membroj perdu la specialecon kaj almenaŭ pagu la ordinaran kotizon. Jen, laŭ mia opinio, la plano por starigi la veran Esperantujon. Atentu, ke por la Hispana Esperanto Kongreso de Sevilla, oni premios la plej bonan kaj simplan projekton pri la temo.

J. M. R.

## LA TRI LUMANTAJ TORĈOJ DE LA ESPERANTA TEMPLO

Egoismo, nescio kaj mallaboremo, estas la tri kaŭzoj por la malbono al nia afero.

En la kerno de ĉiu malbona ago estas egoismo. Tiu, kiu rabas, ĉi tion faras, ĉar li volas tion, kio apartenas al alia; tiu, kiu mensogas, ĉi tion faras je sia propra profito; la fiero nur serĉas sian famigon; tiu, kiu adultas, celas nur satigi sian propran plezuron neatentante la sekvojn de sia konduto.

Pro nescio, oni povas agi malbone, riproĉinde; pro freneza malsaĝo eĉ oni povas efektiviĝi krimon; pro nescio pri la sekvoj de ago, fojojn, oni kaŭzas malprofiton al alia.

Sed ne sufiĉas eviti fari la malbonon devenantan de l'egoismo aŭ de l'nescio; estas necese eĉ praktiki la bonon. Se anstataŭ praktiki la

bonon ni krucumas la brakojn kaj ne ĝin praktikas pretekstante «estas malfacila», ŝajnas ke la preteksto nur signifas mallaboremmon; pro mallaboremo la fumanto kaj la drinkanto daŭrigas fumadon kaj drinkadon eĉ sciante sin malprofiti, kaj ili sin kvalifikas nepovaj sin korekti: estas mallaborema tiu, kiu ne estas akuratema je siaj devoj kaj perdigas la tempon al ceteraj.

*Amo, scienco, aktiveco*, estas tial la tri kaŭzoj por la bono. La diino de l'amo estas Venuso, ne precize de l'volupta amo, kiel kalumnies asertas multaj, sed de la amo plej spirita kaj superega. La diino de la scienco estas Minervo. La dio de la aktiveco (viro por montri plibonigantan energion) estas Herkuleso, aŭtoro de la famaj dekdu laboroj.

Venuso, Minervo kaj Herkuleso estas tri dioj de la pagana religio, ankoraŭ vivantaj, ĉar ili estas tri fokuso, kies potenca lumo heligas la Templon de la Homaro, la Teron, ĉar ĉe kiu ajn loko de ĝi la Homo povas sin turni al Supera Kaŭzo per pensoj pacaĵoj pro l'harmonio de l'senfino; per pensoj de boneco, rigardante la evoluadon de l'Homaro en plej grandan perfektigon de la limoj de l'animaleco al tiuj de la alproksimiĝo al dieco, ĉar se la senfino ekzistas ĉie, ankaŭ senfina estas la homa evoluo. Ni, Esperantistoj praktikadas la tri kaŭzojn por la bono, sed ĉi tion ni vidigu plej evidente per nia tutmonda Unuiĝo.

*F. Redondo.*

## A T E N T U !

Unu el ĵus pasintaj vendredaj kunvenoj de la madridaj samideanoj, en la Kafejo Lisboa, naskis en min ideon pri ĉi tiu artikolo.

Okazis dialogo inter du samideanoj kaŭze de plendo de unu el ili argumentanta ke H. E. A. ne liveras propagandilojn al samideanoj, kaj jen la dialogo:

Plendanto.—Ni bezonas propagandilojn, kiujn ni ne havas kaj H. E. A. devas liveri ilin al ni.

La alia.—Antaŭ ĉio, estas nepre necese, ke ĉiuj samideanoj aliĝu loke al Grupo kaj al H. E. A. ĉar unuiĝo estas forto de ĉiuj vidpunktoj.

P.—Sed per la propagandiloj oni povas varbi novajn adeptojn.

La a.—Jes, tute prave; sed, por havi propagandilojn, ĉu estas necese mendi ilin al presisto?

P.—Kompreneble, estas necese eldoni ilin.

La a.—Kion postulos la presisto? Ke oni pagu lin, ĉu ne?



P.—Tute klare.

La a.—Nu; ni bezonas monon por la pago, ĉu ne?


P.—Certe.

La a.—Kiel, do, havi monon? Ĉu per disiĝo, izoliĝo, de la esperantistoj ni kolektos monon? Ne; por ĝin havi estas nepre necese aliĝi al la Grupoj kaj H. E. A., kaj pagi la kotizojn, por havigi la monon al la kaso, per kiu estos eble eldoni la propagandilojn. Jen la solvo.

Karaj samideanoj spertu per ĉi tiu dialogo: H. E. A. nepre devas eldoni propagandan materialon; iam ĝi eldonis la plej kompletan kaj gravan propagandilon el ĉiuj aperintaj en la tuta esperantista mondo, la libron «Qué es el Esperanto» (Kio estas Esperanto)—5000 espcimenojn—) kiun oni disdonis senpage, kaj tiamaniere, ke ĝi trafis gravajn personojn, Societojn kaj Instituciojn, kaj kiu jam preskaŭ estas elĉerpata, kaj kiun nepre ni devas plibonigi kaj ampleksigi laŭ ĵusaj novaĵoj, kaj reeldoni.

Gvidate de la penso helpi H. E. A. n samtempe mi propagandas mian Bibliotekon, mi proponis liveri senpage al H. E. A. ĝis 500 specimenojn de ĉi tiu gazeto, por ke nia tutlanda Asocio liveru la numerojn dum la tuta jaro al siaj membroj, kiuj PAGOS al ĜIA KASO, KROM LA DU PESETOJ de la jarkotizo (la I<sup>a</sup> jaro, 2,50, ĉar la karneto estas enalkulata), UNU PLIAN PESETON KIEL DONACON (Kompreneble, ĵu pli granda la mondonaco, des pli dankinda); sed ĉiuj devas tre bone atenti ke tiu peseto ne estas por la gazeto, sed por la Kaso de H. E. A. Tiamaniere, en neniŭ lando nacia Asocio havigos al siaj membroj plej malkaran gazeton; en neniŭ lando nacia Asocio havos interesan gazeton saman, per kiu la Asocio eĉ havigos al si monon sen ia ajn elspezo. Ĉu ne ŝajnas ĉi tio apartenanta al fantazia lando en kiu la matura frukto sin direktas de la arbo al la buŝo de loĝanto? Verŝajne la plendanto de la dialogo povus kapti mian proponon por argumenti kontraŭ sia kunparolinto; sed ĉi tiu propono estas de privatulo, kiu ĉu freneza, ĉu saĝa, disponas sian volon, laboron kaj monon, laŭ sia memdecido, kalkulante jam la necesajn rimedojn por la frenezaĵo aŭ saĝaĵo, kaj la proponinto finas dirante al hispanaj esperantistoj: FARU SIMILAN FRENEZAĴON AŬ SAĜAĴON ALIĜANTE AL H. E. A. KAJ DONACANTE UNU PESETON AL ĜIA KASO, kaj tiel nia afero progresos ĉe ni, kaj vi estos kontentaj kaj havos gazeton, kiu satigos vian entuziasmon kaj vin ligo kun la ceteraj samideanoj.

*Julio Mangada Rosenörn*



Vestiblo de la Urbodomo. — Sevilla



## SED... DENOVE ATENTU!

La antaŭan artikolon mi verkis pro la dialogo, kaj la propono al H. E. A. estis kaŭze de la anoncita malapero de «La Suno Hispana», anoncita de S-ro Piñó al mi dum nia vojaĝo al Danzig, per poŝtkarto, kaj fine per la gazeto mem; sed S-ro Piñó decidis eldonadi ankoraŭ tiun gazeton, kaj mi nuligas mian proponon al H. E. A. Sed ĵus ni fondis en Madrido la Grupon «Antaŭen», al kiu mi apartenas, kaj tial ke la laboro de ĝi entreprenata postulas monrimedojn, mi decidis, ke la Grupo liveru «Hispana-Esperanto'n» al ĉiuj hispanaj esperantistoj kondiĉe ke ili estu membroj de H. E. A. kaj pagu DU PESETOJN kaj 25 centimojn al la kaso de «Antaŭen», por havigi al ĉi tiu la monrimedojn, kompletan gazetaron per interŝanĝo, kaj librojn pro recenzoj. La monon sendu al kasistino Natividad Monsell, strato Ruda, 14-Madrid, kaj ne forgesu diri la numeron de via membrokarto kaj skribi klare al adreson. El la libroj, kiujn ricevos la gazeto por la recenzo, oni lotos iujn inter la mondonacintoj.

*J. M. R.*

## LA GRAFO DE SCHAK

En Mecklenburgo (Germanujo), la 2.<sup>an</sup> de aŭgusto de 1815, naskiĝis la grafo de Schak, kiu, de la juneco, sin montris tre kapabla kaj entuziasma por la lingvaj studoj. Li vojaĝis tra la tuta mondo, loĝante longedaŭre en nia patrujo, ĉar la hispanaj historio kaj lingvo lin allogis, kaj li pasigis ĉe ni multe da tempo, elĉerpante el niaj arĥivoj kaj bibliotekoj mirindan materialon, konstante kaj fervore, por la tutmond-fama verko «Historio pri la literaturo kaj drama arto en Hispanujo», kiun li aperigis je 1845, kaj kiun li varme rekomendis al la germana gejunularo. Kaj la Hispanoj devas ĉiam dankadi la grafon, ĉar li faris tion, kio evidentigas al la tuta mondo la veron pri nia glora literaturo kaj teatro: dank' al li oni povas scii pri multaj nekonitaj aŭtoroj de la XVII jarcento, pri la teatraj kutimoj tiamaj; li elĉerpis el libroj kaj manuskriptoj anekdotojn, biografiajn skizojn, k. c., kiujn li saĝe ordigis, kaj unuigis, kaj jen tio, kion li diras per la prologo de sia «Histo-

rio»: «Multaj famaj dramoj italaj, anglaj, kaj speciale francaj, imitas ĉu tute, ĉu parte, aliajn hispanajn, kaj sufiĉas forigi la nebulon, kiu envolvas ilian originon, por ĝoji, lumigante per la historio pri la hispana drama literaturo la literaturojn de aliaj landoj, kiujn tiu evidente influis», kaj li aldonas: «La abundega riĉeco de la hispana teatro estas tiel granda, ke oni povas diri, ne trograndigante, ke ĝi supermezuras tiun de la ceteraj teatroj kune.»

Li parolas pri la teatraj spektakloj de la visgota epoko, pri la mimikaj scenoj de la trobadoroj de la Mezepoko, pri la popola romano kaj ĝia fandigo kun la dramo; pri la teatraj prezentadoj dum la regado de la Reĝa Sciulo, Alfonso X<sup>a</sup>; pri la literaturaj festoj dum la regado de la reĝo Johano II<sup>a</sup>, eminenta poeto; pri la teatro dum la unua duono de la XVI<sup>a</sup> jarcento; pri la aktoraroj, kiuj, ĉifone vestite, penegis, malsate, iradis de vilaĝo al vilaĝo, de loko al loko, de urbo al urbo, semante amon al teatro ĉe la koro de la popolo paganta ilin per malmolaj pecoj el nigra pano. Li diras al ni, ke la unua granda hispana komedio el tri aktoj, kiun oni ludis en Hispanujo, estis verkata de Francisco de Avendaño; kiun oni eldonis je 1553.

Tial ke ni celos pruvi kaj pruvos influon de la hispana literaturo, kaj ni citos la nomon de la grafo, ni volis aperigi unue ĉi tiun artikolon pri la eminenta germano, ĉar li estas nerifutebla atestanto, eminenta aŭtoritato.

## ĈE BIALYSTOCK

Trapasas ni stratojn  
De Bialystock,  
Kaj estas la sentoj  
Al koro sufok'.

De granda soleno  
En lokon ni venas,  
Kaj nian standardon  
Tre alten ni tenas.

Ni antaŭ humila  
El ligno la domo,  
En kiu naskiĝis  
Plej granda la Homo,



Silente staradas,  
Pensante fervore,  
Konscie, homame,  
Sentante tutkore.

Amaso publika  
Okupas balkonojn,  
Fenestrojn, la stratojn...  
Kalkulu personojn!

Eĉ de la tegmentoj  
Forigis tegolojn  
Loĝantoj, montrante  
La kapojn kaj kolojn

De sur la deklivo  
De domaj tegmentoj,  
Kaj kiuj montriĝas,  
Do, strangaj prezentoj,  
Por aŭdi kaj vidi

Malkovri tabulon  
Granitan por glori  
Eterne BONULON,  
KREINTON de lingvo

Por ĉiuj facila;  
Por ĉiuj la dua,  
Pli multe utila,

O! Turo Babela  
Konstante fatala;  
Tutplene belsona,  
Samtempe neŭtrala.

Fariĝas silento.  
Aŭdiĝas la laŭdoj  
De l' Moŝta Urbestro;  
Eksplozas aplaŭdoj

Tondregaj, ekkrioj,  
Samtempe findiras  
Kaj de sur tabulo  
Kurtenon li tiras.

Silento denove.  
Alia parolas.  
La SENT' en la brustoj

De ĉiuj jam bolas.

Jen novaj aplaŭdoj.

Solenon ni finas,

Kaj plenriverence

La kapojn ni klinas.

En la naskiĝdomon

Ni sekve eniras,

Tra kort' en ŝtuparon;

Kaj tute ni miras.

Al pordo pasante

De ĉambro humila,

Nin trafas la FORTO

POTENCA, SUBTILA,

Venante de tie:

Subite ni haltas,

Interne de l'brusto

La koro ja saltas;

Ni falas genuen

Kaj kvazaŭ ni preĝas...


Ĉi tie naskiĝis!...

La SENTO JA REĜAS!


*Julio Mangada Rosenörn*

Verkita sur la «Pologne», tra la Baltika Maro la 13<sup>an</sup> de Aŭgusto de 1927.





Detalo de la fasado de la Urbodomo.—Sevilla



Plafondetalo (vestiblo) de la Urbodomo. — Sevilla



## KRONIKO

Enlanda. *Oviedo-Gijón*. Brave! Antaŭen kun tiel granda entuziasmo kaj fervoro kiel nun, karaj gesamideanoj!—ni ekkrias al niaj kunlaborantoj de Gijón kaj Oviedo, ĉar nenie, krom Sevilla, la samideanaro tiel vigle laboras, sin preparante por sukcesigi nian nacian Kongreson por la jaro 1930. Niaj samideanoj de Asturias same kiel tiuj de Sevilla, trafis la gravan ĵurnalaron: «El Comercio» kaj «El Noroeste» de Gijón, «El Carbayon», «La Región», «La Prensa» kaj «La Voz de Asturias» de Oviedo, kiuj aperigas gravajn artikolojn pri Esperanto kaj esperantaj novaĵoj. La Gazetaro de Asturias, do, konsciis la gravecon de nia helpa internacia lingvo, kaj tiamaniere la ĵurnalistoj de Oviedo kaj Gijón elpravas kiel bone, perfekte, konscias la rolon de nia lingvo koncerne la tutan homan progreson, kaj tial ni povas konstati ke ili okupas avangardan lokon en la vicoj de la tutmonda gazetaro, ne vane ili estas *asturiaj*. Unuanime ĉi tiu gazetaro sin proponis favora por nia estonta Kongreso, kaj ĉi tio, kion ni tutkore dankas, ni ŝuldas al la agemeco de niaj samideanoj de Oviedo kaj Gijón, kiuj kalkulu nian nelacigeblan helpon por ĉio koncerne fari Asturias'n potenca fokuso de Esperanto ĉe la Kantabra regiono, vivoplena kerno de nia movado en tiu hispana parto. La tuta gazetaro raportis pri parolado de S-ro Jiménez Mora en la Ateneo, pri Esperanto, la 20<sup>an</sup> de la ĵus pasinta januaro.

Ĉe la Ateneo de Oviedo, estas speciala kurso por virinoj, gvidata de S-ro Jiménez Mora, kiu proponis ankaŭ al la provinca Deputataro senpagan kurson por la Orfejo, donacante gramatikojn al la orfoj, pro kio la Deputataro dankis lin. Dezirinde estas, ke samideanoj de aliaj lokoj, kiel Santander, Coruña, Orense, Lugo, Burgos, Valladolid, Huesca, Zaragoza, Jerez, San Fernando, k. c., kie la movado estis iam sufiĉe granda imitu la samideanojn de Gijón kaj Oviedo; ni avidas ricevi samajn novaĵojn.

*Madrid*. La 3<sup>an</sup> de januaro oni starigis leĝe la Grupon «Antaŭen» (oni forigis al la nomo «kurage»), kunveninte unue sub prezido de medicina D-ro Karlo de San Antonio, kiu klarigis la kialon pri la fondo de la Grupo, legis la Regularon kaj proponis: S-ron Alberto San Antonio, Prezidanto; S-ron Vicente Moreno, Sekretario; F-inon Natividad Monsell, Kasistino; S-rojn Jacinto Martín, Jose Lerroux kaj Juan Varea, 1.<sup>a</sup>, 2.<sup>a</sup> kaj 3.<sup>a</sup> Voĉdonantoj, por la Komitato. Oni akceptis unuanime la proponon, kaj tial D-ro San Antonio cedis la prezidantecon al la elektito, kiu kortuŝe dankis la honoron kaj fliĝon al li. La kunvenon ĉeestis

samideanoj de la Grupo de Madrid kaj la nova Grupo konstatas, ke ĝia agado estos kvazaŭ agado de la malnova kaj grava Grupo de Madrido.

La unua oficiala laboro de «Antaŭen» okazis en la Ateneo la kvinan de la sama monato per parolado kaj demonstracio pri Esperanto kaj ĝia utileco por disvolvi efike la laboron de la lernejoj por la tutmonda Paco, tial ke por madrida Instruistaro estis organizata la okazintaĵo. La parolado de S-ro Mangada Rosenörn rimarkigis pri la Internaciaj Konferencoj de Praga kaj Locarno, pri la nunaj cirkonstancoj vidigantaj eble baldaŭan militon, kaj atentante ke la sola krisolo kapabla fandi la armilarojn estas la lernejoj, sed ne nur per instruado kaj edukado, sed ankaŭ por tute nepre sinsekva alproksimigado de generacioj el infanoj per interŝanĝo konstanta PER ESPERANTO, ĉar tiu interŝanĝo naskas unue *kuriozemon*, ĉi tiu iom post iom fariĝas *intereso*, ju pli granda, des pli la tempo pasas; la *intereso* transformiĝas *simpatio*, *estimo kaj amo puraj*, kiel de *puraj koroj*, por fariĝi laste *sento de forta frateco*. La infanoj fariĝos knaboj, junuloj kaj maturuloj, kaj daŭrigante la interrilatiĝadon dum tiuj epokoj, konante kaj amante sin reciproke, ili certe formos tutmondan frataron. La gramofono funkciis aŭdigante la parolon de D-ro Privat pri prononcado; lernanto de unu monato, konante iujn fremdajn lingvojn, sufiĉe bone sin montris Esperantparolanto, mirigante la ĉeestantaron. Fine, ĥoro el F-inoj Monsell (fratinoj Natividad, Anselma, Teresa kaj Elena), Lucrecia San Antonio kaj Carmen Cobo, kaj S-ro Vicente Moreno, kantis popolajn kantojn (hispanajn kaj fremdajn), ludante la pianon F-ino Anselma Monsell tre sperte. Oni disdonis la gravan propagandlibron «Qué es el Esperanto» (Kio estas Esperanto), kiu temas pri Ligo de Nacioj, pri Internaciaj Konferencoj, pri diversaj movadoj, pri U. E. A. pri gravaj opinioj de tutmond-famaj eminentuloj el ĉiuj landoj (Tolstoj, Reclus, Barbusse, generalo Leman, Max Müller, k. t. p.) kaj pri la Fundamento (kompleta Fundamenta Gramatiko). Ekspozicio el nombraj gvidlibroj, anoncoj gazetoj kaj foirafiŝoj, interesis la publikon.

La poŝtaj kaj telegrafaj samideanoj celas starigi sian hispanunuigon, kaj niaj entuziasmaj samideanoj Rodríguez Escartín kaj Barrios baldaŭ finos sukcese sian laboron por fondi ĉi tie fervojoficistan Grupon kaj la Hispanan Ligon de Fervojoficistoj. Jaŭdon 26<sup>an</sup> de januaro, ĉeestis la kunvenon de la Madrida Rotaria Klubo samideanoj Karlo de San Antonio kaj Julio Mangada Rosenörn kaŭze de invito al ili, ĉar la dua tradukis esperante la himnon de la Rotarioj. Post la tagmanĝo S-ro Mangada elpruvigis al la Rotarioj, ke la esperanta celo estas sama, kia



estas tia de la Rotarioj, kaj ke, krom tio, la agado de la Rotarioj postulas nepre duan lingvon, kiel dum la Kunveno mem evidentiĝis, ĉar ĉeestis alinaciaj Rotarioj, el kiuj nur parolis portugala rotario naci-lingve, kaj kiun apenaŭ oni komprenis spite de la simileco de la hispana kaj portugala lingvoj. Je la fino, la ĥoreto de la Grupo «Antaŭ-en» kantis la Rotarian Himnon, tiun de la Grupo kaj iujn fremdajn popolkantojn. La Rotarioj estis trafe impresitaj, ili interesiĝis al nia afero, kaj speciale S-roj Fernández Ardavín kaj Alonso, aŭtoroj de la poemo kaj muziko respektive, miregis pro belsono de nia lingvo por la versfarado kaj kanto. Sur la venonta numero aperos la himno, kiu certe fariĝos universala. Koincidante kun la Hispan-amerika Ekspozicio okazos en Sevilla Kongreso el Rotarioj de lingvo kispana sed certe ĉeestos alilingvaj, tial fremdaj samideanoj agu apud Rotariaj Klubo, kaj ankaŭ agu, ĉar estas TRE GRAVE koncerne la jenon:

De la 5<sup>a</sup> ĝis la 9.<sup>a</sup> de oktobro de ĉi-tiu jaro okazos en Sevilla Internacia Kongreso de Urboj, kiun oni aranĝas interkonsente kun la Internationale des Villes. Gravaj urboj de Anglujo-Germanujo-Francujo Belgujo-Hungarujo, k. c., de Eŭropo kaj Ameriko eĉ de Japanujo, partoprenos la Kongreson per Delegitaroj el la urbaj Konsilantaroj; tial la samideanoj ĉie devas sin turni al la urbaj Konsilantaroj kaj sin proponi por lernigi Esperanton al Delegitoj kaj profiti la okazon por altiri atenton al nia afero.

La Grupo «Antaŭen» liveras delikatajn arĝentajn esperantajn insignojn. Prezo: du pesetojn 25 centimojn. Vi vin turnu al S-ro Vicente Moreno, strato Mayor, 86. Madrid.

*Eksterlanda. Pri la Kongreso en Budapeŝt.* S-ro Friedrich Perles sin turnis al mi por ke la Hispanoj organizu nian Universalan Kongreson por 1929 en Madrido. Neniel, ni ne baros la vojon al niaj karaj kungaraj samideanoj; male, ni helpos ilin laŭ eblo. Tute klare H. E. A. per sia reprezentanto en Danzigo, S-ro Andrés Piño, esprimis sian opinion, kaj same mi faris, koincidante; kaj nia seriozeco postulas al ni ne atenti aferojn tute fremdajn je la neŭtraleco starigita de la Regularo por niaj Kongresoj, despli hodiaŭ, kiam travivante la sekvojn de la tutmonda milito, fanatika naciismo, kaj aliaj abomenindaj *ismoj*, gvidas ne nur registarojn sed popolojn kaj gentojn en reciprokajn malfidojn, agojn, k. c. Ni ne miksu kun nia sankta afero tion pri kio ne estas kulpaj Esperantistoj. Estu certa S-ro Perles kaj ĉiuj karaj germanaj samideanoj, ke same ni estos tutekore ageme kun ili por sukcesigi Kongreson en Germanujo por alia jaro. *Mangada Rosenörn.*

*Esperanto en lernejoj de Saksujo.* Laŭ statistiko de oktobro 1927 disvolvigadas 74 kursoj en lernejoj de 33 lokoj: 5 kursoj estas devigaj; 5 privataj.

Francujo. La Kompanio H. Farman de Aerlinioj enkondukis Esperanton por sia tuta oficistaro (pilotoj, k. t. p.), kaj estas dezirinde, ke same faru ĉiuj aliaj samaj kompanioj, kaj radiotelegrafistoj de la ŝtatoj kaj privataj Kompanioj, ĉar estas evidente ke alpreno de Esperanto en tiuj rondoj de la nuntempa progreso ĉi tiun des pli akcelos. Ni rekomendas al nia samideano, subkolonelo E. Herrera, tutmondfama eminenta aŭtoritatulo pri aervetura problemoj, ke li atentigu la hispanajn Kompaniojn de Aerlinioj pri la gravega decido de H. Farman.

## HISPANA ESPERANTO-BIBLIOTEKO

celas eldoni jare dekdu kajerojn, ĉiu el ili 32 paĝa almenaŭ, ĉiam kun la sama formato  $13\frac{1}{2} \times 19\frac{1}{2}$  ĉm., pri literaturo, historio, legendoj, arto, k. c., de Hispanujo, kvankam iufoje aperigos rimarkindajn fremdajn tekstojn, kun ilustraĵoj foje, sur luksa papero, por havigi al la Esperantistaro interesajn legotaĵojn.

Abono por la serio estas OK pesetoj KVINDER centimoj, por ĉiuj landoj, kaj abonanto rajtas ricevi senpage ĉi tiun gazeton, kaj ĵus aboninte la Bibliotekon, li ricevos NAŬ kajerojn el ili: «AVILA» kun 30 bildoj; «FERDINANDO VI kaj FARINELLI», novelo verse kaj proze verkita; «EL MODERNA HISPANA PARNASO» kun belegaj bildoj; «PRI HISPANUJO KAJ ĜIAJ POPOLKANTOJ», kun muzikaĵoj de Murcia; «DU JUNAJ FRAŬLINOJ» kaj «KORNELIINO», du noveloj de la aŭtoro de «DON KIĤOTO»; «DON KIĤOTO» (unuan kajeron de la tutmondfama verko de Cervantes), k. c. Ĉi tiu lastan kajeron nur havigos aparte S-ro Ludoviko Torrent (Presejo. Strato Válgame Dios, 6-Madrid), al kiu povas sin turni por mendoj interesatoj. S-ro Torrent faros rabaton, 10%, kiam mendo minimume atingos 50 specimenojn; por mondo de 250, 500 kaj 1.000 specimenoj. la respektivaj rabatoj estas 20%, 30% kaj 40%. Ĉiam estas postulata antaŭpago.

Speciale la Grupoj kaj Asocioj devas aboni la Hispana Esperanto-Biblioteko'n, ĉar neniu alia libraro kune kun tre interesa kaj bela gazeto estas pli malkara, ol la Hispana, kiu samtempe estas tre fidinda, ĉar abonanto, tuj de post la abono, ricevos naŭ librojn, kaj ĉiumonate kun granda akurateco ĉi tiun gazeton.

---

PRESEJO LUDOVIKO TORRENT KAJ K<sup>o</sup>  
Válgame Dios, 6-MADRID-HISPANUJO